

# esperanto sub LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

novembro - deembro 2006 • numero 84 | volumo 14 - numero 6



La unua Esperanto-klub-kunven-  
ejo en Melburno, 1910'oj-  
1920'oj; nuntempe loĝejo de  
Marcel Leereveld.

(Vidu p.3)

ISSN 1039-9380

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIJO

N<sup>o</sup> 84 • Vol 14.6 • Nov.-decembro 2006

**Redaktoro:** Donald Broadribb

## ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, uzante la programon Mellel, kaj la tiparojn Futura, Onyx kaj New Century Schoolbook.

## ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libro-servo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

[libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas \$A3.00 + poŝtsendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

*Esperanto sub La Suda Kruco* estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

## *Esperanto Sub La Suda Kruco*

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎(08)96411937 • 📠(08)96411134

[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldono respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2006, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* preparis Igor de Oliveira Couto.

## En Ĉi Tiu Numero

Kelkaj historiaj fotoj (Marcel Leereveld).....	3
Raporto de la sekretario (Miranda Lutz).....	5
Bela Florenco (Heather Heldzingen).....	6
Demando pri kredo (Gaye Phillips)	7
Interrete.....	10
AEA-forumoj	
Komputilprogramoj en Esperanto	
Via redaktoro.....	10
Kial la kontraŭprofesiismo? (Igor Couto).....	11
Konu viajn kungesamideanojn: Ashley Campbell.....	13
Historieto pri la rolo de teknikaĵoj en Esperanto en Aŭstralio (Terry Manley).....	14
Raporto de la prezidanto (Igor Couto).....	15
Profilo de nia prezidanto (Penny Vos).....	17
Nekrologo: Edna May Turvey (Terry Manley).....	20
UMEA.....	21
Hazairin (Dianne Lukes).....	22
Esperanto-domo: la juvelo en la krono (June Perkins).....	25
Pri la statuto (Marcel Leereveld).....	27
Indekso 2006.....	28

Retejo de Aŭstralio Esperanto-Asocio:

<http://esperanto.org.au>

Retejo de Novzelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.nz/>

**Bonvolu atenti ke pro la feritagoj fine de la jaro, la absoluta limdato por la januara *EN* estas la 5a de decembro.**

## Kelkaj historiaj fotoj de Marcel Leereveld




1947

En la jaro 1947, post la dua mondmilito, parto de Germanujo plu okupatis de la brita armeo, kaj la germanaj esperantistoj ankoraŭ ne rajtis vojaĝi eksterlanden, do ne al la tiujara internacia S.A.T.-kongreso en Danujo. Multaj nederlandaj S.A.T.-anoj decidis vojaĝi vagonare al tiu Kongreso, pasante tra Hamburgo kie, avertite, estis granda grupo de Esperantistoj sur la perono de la centra stacidomo, por saluti nin. La brita armeo malpermesis al ni doni donacojn aŭ nutraĵojn al la germanoj, sed ni rajtis interparoli. Iu fotis nin laŭ la ĉi supra foto. Alida Leereveld rigardas el la fenestro tute dekstre. Ni tute ne konis la germanojn, sed kiam ni estis enmigrintaj en Aŭstralion, ses jarojn poste, ni renkontis en A.E.A.-Kongreso personon, ankaŭ enmigrinton, kiu similis al la juna persono (la dua de maldekstre) sur nia foto. Ni montris ĝin al li, kaj efektive li estis Volo Gueltling, de Sidnejo.



AEA-estraro 1960

En 1960 la A.E.A.-kongreso okazis en Hobarto. Ni havis fortan Esperanto-grupon tie, i.a. plurajn instruistojn, kaj la lingvo instruatis devige en la sepa kaj oka klasjaroj (de mi kaj de George Lancaster) en The Friends' School. Tiu kongreso estis la lasta en Hobarto ĝis januaro 2007. En la foto montriĝas la tiama Estraro de AEA, el maldekstre dekstren: Ken Linton, Kasisto; Ralph Harry, Vicprezidanto; Marcel Leereveld, Prezidanto; D-ro Ross Robbins, Vicprezidanto; kaj Herbert Koppel, Sekretario. La Kongreso estis granda sukceso.



Marcel Leereveld nun

### Mia historia domo

La domo konstruatis en 1904, kaj en ĝi loĝis loke historia F-ino Sofia Giles, kiu kiel kvalifikita ins-

truisto kaj pro peto de la ĉirkaŭloĝantaj kamparanoj (50km for de Melburno) starigis malgrandan elementan lernejon registaran en sia loĝĉambro):



La iama elementa lernejo kaj Esperanto-klubkunvenejo de Sofia Giles, samtempe loĝĉambro.

*La domo de Marcel Leereveld: kun longa historio*

Teniĝis en la unu ĉambro ĉiuj ses klasniveleoj, kun ja unu instruisto (F-ino Giles). Ni en 1966 aĉetis la

domon (ĝi nun estas sur la t.n. heredaĵlisto) kaj renkontis la tiam maljunan instruistinon plurfoje.

Nur post ŝia morto ni eltrovis el malnova Esperanto-gazeto ke ŝi estis Esperantisto kaj havis esperanto-klubkunvenojn en sia (nun

nia) loĝĉambro en la 1910-aj kaj 1920-aj jaroj. Ankaŭ ŝi ne sciis, ke ni estis esperantistoj, kvankam ni estis najbaroj. □

## Raporto de la Sekretario Miranda Lutz

Ĉi jaro estas interesa jaro por AEA. Mi resume raportas pri sep aferoj ĉi tie. Bonvolu kontakti min se vi volas pli da detaloj.

### Membreco kaj ĝisdatigo

Kun ĉi tiu eldono de *ESK* estas membreca formularo. Ni trovis ke necesas ŝanĝi la administran jaron por esti sama kiel la financa jaro, do, por ordigi kaj agi laŭ tiu ŝanĝo, via venonta membreca periodo daŭros de 1 januaro 2007 ĝis 30 junio 2008 (18 monatoj anstataŭ 12). Bonvolu sendi al la Sekretario vian novan membrecan formularon kiel eble plej baldaŭ (notu ke vi devas esti membro por voĉdoni). Mi ankaŭ ĝisdatigas la detalojn de la membroj do bonvolu informi min pri ŝanĝoj.

### Biblioteko<sup>1</sup>

La kolekto de libroj kaj aliaj esperantaj aferoj en Kanbero estas nun en ŝrankoj kaj ne publike atingebla. Por ke tiu kolekto estu uzebla, ni devas trovi alian lokon por ĝi. AEA bezonas helpon trovi taŭgan ejon. Bonvolu kontakti nin aŭ Hugh Malcolm-on por pli da informo.

### Raporto pri "korporaciigo" kaj administraj aferoj

Diskutitaj dum la lastaj jarkunvenoj estis la "korporaciigo" kaj administraj aferoj. Post monatoj da enketo kaj informoserĉado, la raporto de la komisiono estas preta kaj estos sendita al la membroj baldaŭ. AEA nuntempe estas "korporacia" asocio registrita ekskluzive en A.C.T. Estas diskuto pri ŝanĝi ĝin al tutlanda "korporacio"/"kompanio limig-

ita per garantio"<sup>2</sup>

### Libroservo

Pro la komisionaj enketo kaj raporto, estis kelkaj ŝanĝoj al la libroservo. Ĝi nun refunkcias per la helpo de volontuloj. Se vi volas helpi, ni invitas vin verki recenzon pri libro ĉe la retbutiko de la libroservo. Pli da informo estas atingebla ĉe [www.libroservo.esperanto.org.au](http://www.libroservo.esperanto.org.au)

### Reformoj

Nova maniero por disdoni informon kaj diskuti AEA-aferojn estis provita kaj nun ni invitas ĉiujn partopreni. Ni esperas ke ĝi estos pli bona metodo por komunikado. La adreso estas: [forumoj.esperanto.org.au](http://forumoj.esperanto.org.au).

### Ŝanĝoj al la sistemo de voĉdonado

Dum iom da tempo estis diskuto pri la procedo por voĉdonado. La estraro decidis, ke por la venonta elektado, voĉdonado per poŝto estos permesata. Tiu sistemo malsimilas al la pasintaj sistemoj kaj ĝi celas doni al ĉiu membro eblecon voĉdoni por la venonta estraro. Ĝi ebligas tiujn kiujn ne povas partopreni la jarkunvenon (en Hobarto dum januaro) voĉdoni rekte. Post la ricevo de formularoj por nomumado, vi ricevos balotilon per poŝto. Ni petas vin aŭ sendi ĝin per poŝto (per afrankita koverto) aŭ kunporti ĝin al la somerkursaro en Hobarto. La balotiloj estos kalkulitaj dum la unua tago de la jarkunveno kaj la nova estraro estos elektita dum la jarkunveno. Bonvolu kontakti min se vi havas iujn demandojn.

[sekretario@esperanto.org.au](mailto:sekretario@esperanto.org.au) □

<sup>1</sup> En la januara *ESK* ni aperigos detalan raporton de Hugh Malcolm pri ĉi tio. — [d]

<sup>2</sup> Temas pri la jura stato de AEA. kies korporacia stato nuntempe validas nur en A.C.T. — [d]

## Bela Florenco de Heather Heldzingen

Dek tri Aŭstralianoj prenis parton en la 91a UEA-kongreso en Florenco de 29 Julio ĝis 5 Augusto. La kongresejo lokiĝis en bela iama palaco en la centra parto de la urbo. Bela ĝardeno antaŭ la palaco donis oportunojn al la ĉeestantoj renkontiĝi, babili kaj malstreĉiĝi kun novaj kaj malnovaj amikoj. La kongresa programo estis plena je interesaj kaj diversaj temoj, inkluzive de lingvaj kursoj, Internacia Universitato, koncertoj, teatraĵoj, kaj internaciaj vesperoj. La italaj es-

tago aŭ unu tago, ekzemple Pisa, Sienna, San Gimignano kaj Assisi. Ege ĝinda distraĵo por la partoprenantoj estis prezentado de flagflirtistoj en la Placo de la Sinjoro.

Dum la solenaj malfermo kaj fermo de la Kongreso, ni estis honoritaj aŭdi paroladon de la nepo de D-ro Zamenhof, kies nomo estas Ludoviko Zaleski-Zamenhof.



Kep Enderby kun la urbestro de Verona perantistoj prezentis paroladojn pri multaj italaj temoj: Renato Corsetti parolis pri *Kiel Italaj Italas*; Ranieri Clerici pri la *Renesanco*, Nicolino Rossi pri *Petrarca*, kaj Aldo Grissini pri *Italaj Operoj*, kio donis al la aŭdantoj bonan senson aŭ guston pri Italujo.

La italaj organizantoj bone prizorgis la ĉeestantojn per ekskursoj al galerioj kaj palacoj en Florenco kaj al urboj atingeblaj dum duona



Aŭstralia "budo" ĉe la UK

Sabatvesperon kun esperantistoj el la tuta mondo, ni preparis budon en la kongresa ĝardeno por informi aliajn esperantistojn pri la movado en Aŭstralio kaj pri la Somerkursaro en Hobarto. Multaj esperantistoj informis nin, ke ili partoprenis en la UK en Adelajdo kaj havas bonajn memorojn pri la kongreso, Aŭstralianoj, kaj nia lando. Dum tiu foiro ni ricevis pozitivajn komentojn pri 3ZZZ kaj enketojn pri bone konataj kaj estimataj aŭstraliaj samideanoj Marcel Leereveld kaj Franciska Toubale. Fran-

ciska estas precipe bone konata pro sia klopodado en Vjetnamo, Nepalo kaj Koreo.



En Sicilio

Esperantistoj el 62 landoj kiuj partoprenis la kongreson spertis nur bonajn humorojn, bondezirojn kaj bonamikecon.



Esperantistoj ĉe Verona

Estis granda plezuro resti kun tiaj personoj tiutempe. Se vi interesiĝas vidi fotojn pri la kongreso, bonvolu viziti la Melburnan Retpaĝon, [www.melburno.org.au](http://www.melburno.org.au) kaj klaki “Galerio”. □

## Demando pri kredo Verkita de Gaye Phillips

Antaŭ du/tri jaroj, kelkaj militaj policanoj frapis ĉe la antaŭa pordo de domo en antaŭurbo de Sydney. Viro kun mezorienta aspekto malfermis la pordon.

“Sadik Ahmen?” demandis unu el la policanoj.

“Jes.”

“Ĉu vi konas Rami Azzin-on?”

“Ne tre bone. Li estas amiko de amiko.”

“Ĉu tiu viro loĝis kun vi dum kelkaj tagoj antaŭ ne longe?”

“Jes, lastan monaton — sed nur dum tri tagoj.”

“Ĉu vi konsciis ke la aŭstralia

registaro serĉas lin rilate al lia kamaradeco kun la suspektata teroristo Mohamed Rami?”

Sadik Ahmen ŝultrotiris. “Li venis al mi por peti helpon — por peti ke mi gastigu lin nur ĝis kiam li faros aliajn aranĝojn.”

“Kial vi ne telefonis la policon?”

“Ĉar nia kulturo diktas ke se iu homo petas helpon ni devas doni ĝin; kaj tion mi faris.”

-----  
Mi legis tiun novaĵeron en taga ĵurnalo, kaj ĝi memorigis min pri incidento kiu okazis en la sep-

dekoj. Konforme al la kutimo de la gejunuloj en tiu tempo, mia filino Julia kaj ŝia amikino Stela decidis iri eksterlanden por vidi la mirindaĵojn de la mondo kaj sperti aventurojn. Do, kiam ili havis la aĝon de deknaŭ kaj kun ne multe da mono (ho, la senpacienco de juneco!), ili ŝipveturis al Suda Afriko. En tiu lando, dum la sekvaj kelkaj semajnoj, iliaj revoj pri mirindaĵoj kaj aventuroj — kvankam iomete malbriligitaj — certe realigis; sed tio estas alia rakonto.

Unu vesperon ili trovis sin en malgranda urbo en Sudano. Ili celis al Kartumo, kie espereble leteroj — kaj eĉ pli grave, mono — de la gepatroj atendas ilin. Kvankam estis nur unu horo antaŭ noktiĝo, la varmo de la suno estis tiel forta kiel meztago. La knabinoj sciis ke post la sunsubiro la dezerta aero repide malvarmiĝas, kaj ili ne havas loĝejon por la nokto. Kutime ili penis alveni en lokon sufiĉe frue por serĉi loĝejon. Sed tiun matenon ili kalkulis ke iliaj kombinitaj dinaroj ne estas sufiĉaj por aĉeti du busbiletojn al Kartumo. Do ili petveturis en kaduka ŝarĝaŭto kiu survoje multfoje paneis. Ĝi fine malrapide elskuis ilin en Wad Medoni-n, kaj kun laŭta siblo haltis. Malgraŭ admonoj kaj piedfrapoj de la veturigisto, kaj multe da konsiloj de la spektantaro, la motoro rifuzis eligi eĉ unu sonon. Nun la du junulinoj devis alfronti la seriozecon, eĉ la danĝeron, de sia situacio. Piedirante en la direkto de la

urbcentro ili diskutis la solvon al sia ĉefa problemo — kie ili tranoktos?

“Ni ne havas monon por la plej malmultekosta, malpura, pulinfestita loĝejo”, suspiris Julia. Tiu blukula blondulino, kiu plejparte havis pozitivan perspektivon pri ĉio, nun komencis sperti maltrankvilajn sentojn.

Stela, beleta, gracila kun brunaj hararo kaj okuloj, ne estis multe ĉagrenita. Dum sia vivo ŝi trovis ke io aŭ iu kutime intervenis por savi ŝin de ia ĝenaĵo. Alia afero pli okupis ŝian menson.

“Mi estas malsata”, ŝi diris. “Ĉu ni havas ion por manĝi?”

Julia, kies vico estis porti la manĝaĵojn, serĉfosis en sia dorsako.

“Ok malfreŝaj daktiloj, unu malmola panbulo, kaj duonbotelo da varma akvo”, ŝi respondis.

Sidante sur la sablo en la ombro de aro da palmoj, ili silente maĉis la sengustan manĝaĵon.

Subite Stela ekkriis, “Ibrahim, jen lia nomo!”

“Ibrahim! Pri kiu vi parolas?” demandis Julia.

“Tiu viro kiu amikiĝis kun ni ĉe la junulara gastejo en Johannesburgo.”

“Nur kun vi. Miaj ĉarmoj ne interesis lin.”

Ŝi aldonis per iomete acida voĉo, “Nun ne estas la tempo revii pri viaj malnovaj amaferoj, Stela. Post nelonge la nokto alvenos. Kion ni faros kiam tio okazos?”



“Eble mi havas solvon. La nomo ‘Wad Medoni’ pensigis min pri Ibrahim. Li diris al mi ke li havas onklon kiu loĝas en ĉi tiu urbo — tre agrabla viro kiu certe gastigos nin.”

Julia ekscitite ekstaris, dirante, “Kie li loĝas?”

“Mi ne scias. Ibrahim ne donis al mi lian adreson.”

“Multe da helpo tio estas,” laŭte ĝemis Julia.

“Nu, li menciis ke la domo de la onklo alfrontas la vendoplacon. La onklo havas multe da mono, kaj la domo estas la plej granda en la strato.”

“Ni preterpasis la vendoplacon survoje al ĉi tie. Rapidu! Ni devas serĉi la domon dum ankoraŭ restas lumo.”

Kiam ili alvenis ĉe la vendoplando la sunbrilo jam malaperis; sed la stratlampoj lumigis scenon de koloro kaj aktiveco. La placo estis plena de homoj — akrobatoj, serpentoĉarmistoj, berberoj el la dezerto kun gregoj da ŝafoj kaj kaproj, akvovendistoj kaj almozuloj. Manĝajvendistoj subĉiele kuiris kokidaĵon kaj viandon. Budoj elmontris ledajn, kuprajn kaj arĝentajn varojn, kaj aliaj bele koloritajn vestaĵojn kaj teksaĵojn. En la fono senĉese batis la pulson tamburoj. Ili marŝis laŭ la periferio de la vendoplando, ĉirkaŭataj de infanoj plorblekantaj “dinaro! dinaro!”.

“Imŝi”<sup>3</sup>, kolere ordonis Julia,

sed la bubaro daŭrigis turmentadi ilin.

La plimulto de la konstruaĵoj apud la vendoplando konsistis el fabrikoj kaj butikoj, kun nur kelkaj domoj. Ĉi tiujn la knabinoj avide pririgardis. Unu estis pli granda ol la aliaj, kun bela ĝardeno ĉirkaŭita de palisaro.

“Sendube la domo de riĉulo”, rimarkis Julia. “Ĝi devas aparteni al la onklo de Ibrahim.”

“Kion ni diros al li?” demandis Stela. “Ni ne scias lian nomon nek la familian nomon de Ibrahim.”

“Lasu min paroli kun li.” Julia, kiu posedis langelokventecon, ofte tiris avantaĝon el tiu talento. Ili frapis ĉe la pordo de la granda domo, kaj ĝi estis malfermita de araba viro en burnuso.

“Saluton”, vigle diris Julia. “Ni estas amikoj de via nevo Ibrahim. Li sendas al vi plej bonajn deziraĵojn. Ni celas al Kartumo, sed la veturilo en kiu ni estis pasaĝeroj paneis, kaj pro la mallumo ni timas serĉi loĝejon. Ĉu vi povas gastigi nin ĉinokte? Ni bezonas nur malgrandan spacon kie ni estos sendanĝeraj.”

La viro momente rigardis ilin, tiam ridetis. “Envenu”, li diris.

“Mia nomo estas Omar”, li daŭrigis, kondukante ilin en grandan salonon. “Permesu al mi prezenti mian edzinon Dhalia kaj filinojn Aŝa kaj Kumal.”

Post la vespera manĝo, Julia kaj Stela pasigis kelkajn plezurigaĵajn horojn kun la familio, respond-

<sup>3</sup> emshee (araba) = iru for!

ante al demandoj pri Aŭstralio. Aŝa kaj Kumal karesis iliajn pal-  
ajn vizaĝojn kaj la blondan har-  
aron de Julia. Matene, post bona  
noktodormo en sia propra dormo-  
ĉambro, ili adiaŭis la familion. “Ni  
tre dankas vin pro via bonvolo”,  
diris Julia sincere.

Stela aldonis, “Ibrahim sciigis  
min ke vi estas agrabla viro. Mi in-  
tencas skribi al li pri nia vizito. Ĉu  
vi diros al mi lian familian nom-  
on?”

“Mi ne povas fari tion”, ridetis  
Omar. “Mi ne havas nevon kiu  
nomiĝas Ibrahim.”

“Sed kial...?” Julia rigardis lin

kun granda konsterniĝo. “Kial vi  
invitis nin en vian domon?”

“Ĉar vi bezonis helpon.”

“Sed vi ne konas Ibrahim-on,  
kaj ne havas devon helpi amikojn  
de fremdulo.”

“Vi venis al mi por helpo, kaj  
nia kulturo diktas ke se iu homo  
petas helpon ni devas, se iel eble,  
doni ĝin.”

P-S: Du jarojn poste Stela ha-  
zarde renkontis Ibrahim-on en lon-  
dona strato. Li klarigis ke lia on-  
klo loĝas kontraŭ pli malgranda  
vendoplaco en alia parto de Wad  
Medoni. □



## • Interrete

*AEA nun havas proprajn forumojn:* <http://forumoj.esperanto.org.au/>.  
Oni povas legi la forumojn laŭvole; por kontribui, oni devas membriĝi per  
elekto de uzantonomo kaj pasvorto. (Neniu kosto.)

*Aŭstralio ankaŭ havas retdiskutliston* epoŝtan. Ĝia adreso por mem-  
briĝi estas <http://groups.yahoo.com/group/esperantoaustralia/>

### Komputilprogramoj en Esperanto

(1) **Mellel**, vortilo multelingva-kapabla, haveblas en pli ol deko da  
lingvoj, inter ili estas Esperanto-versio preparita de Donald Broadribb.  
Elŝutebla ĉe [www.redlers.com](http://www.redlers.com), prezo: US\$49. Uzebla nur per Macintosh  
OS X.

(2) **Scribus**, programo por enpaĝigi eldonaĵojn. Ĉi tiu programo hav-  
eblas senpage por Macintosh OS X, [www.scribus.com](http://www.scribus.com).

(3) **Esperantoedit**, vortilo por Linukso kaj Windows. [www.xdo-  
bry.de/esperantoedit/](http://www.xdo-bry.de/esperantoedit/).

## Via redaktoro

raportas ke en aŭgusto li ricevis HDR-braĥiterapion pro kancero de sia  
prostato. HDR signifas granda-dozan radiadon. Braĥiterapio estas procedo  
puŝi longajn “pinglojn” tra la peritoneon en la prostaton, kaj per dratoj  
konduki zorge mezuritajn dozojn de gamaj radioj en la kancerajn ĉelojn en  
la prostata. La celo estas detruigi la kancerĉelojn. La procedo ŝajnas sukcesa.

# Kial la kontraŭprofesiismo?

Respondo al Franciska Toubale  
de Igor Couto

Al mi ŝajnas, ke kiam oni konsideras ĉu uzi aŭ ne la helpon de profesiuloj, oni konstatas, ke ekzistas kutime 3 kazoj:

1) situacioj en kiuj oni tute ne bezonas helpon de profesiuloj: ekzemple, se vi invitas amikojn al verspermanĝo ĉe vi, oni kutime ne bezonas dungi profesion kuiriston por prepari la manĝaĵon. En ĉi tiaj situacioj, la uzo (aŭ ne) de profesiuloj estas tute senkonsekvenca.

2) situacioj en kiuj oni ne vere bezonas la helpon de profesiuloj, sed en kiuj la helpo ja estus bona: se mi faras planon por rekonstrui mian ĝardenon, mi certe povas fari la tutan studon kaj esploron tute sola, kaj sendepende decidi kiujn materialojn uzi, kiujn plantojn aĉeti, ktp. Mi certe ĝuos la sperton, sed mi ja bezonos pli da tempo — kaj, depende de kiom da eraroj kaj miselektoj mi faros en miaj planoj, eble mi bezonos ankaŭ pli da mono — ol se mi estus dunginta profesiulon por almenaŭ helpi min. En ĉi tiaj situacioj, la helpo de profesiuloj ofte povas ŝpari al ni monon, kaj montri al ni kiel esti pli efikaj estontece. Tamen, en ĉi tiaj situacioj la ne-uzo de profesiuloj ne havas seriozan konsekvencon, krom eble sennecesa perdo de mono kaj malŝparo de tempo.

3) situacioj en kiuj oni ne nur

bezonas, sed devas — ofte laŭleĝe — uzi profesiulojn. Oni certe ne rajtas — en la plejmulto de la landoj de la mondo — operacii je homoj, piloti aviadilojn, aŭ ĝenerale agi aŭ respondecii pri gravaj aferoj, kiuj tuŝas la vivon aŭ de multaj, aŭ multe profunde, sen esti oficiale agnoskita kiel “profesiulo” en sia fako de respondeco. En ĉi tiaj situacioj, ne uzi profesiulojn havas gravajn konsekvencojn — granda perdo de mono, perdo de libereco, perdo de sia propra vivo.

La leĝo de nia lando devigas nin, ofte, uzi profesiulojn. Oni ne rajtas prizorgi infanojn en lernejoj sen havi la oficialajn atestilojn kaj permesojn. Oni devas ricevi “green slip” por sia aŭto, de profesia mekanikisto. Oni devas esti profesia operaciisto, por operacii je homoj. Oni devas esti profesia piloto por piloti aviadilon.

Nu, tiuj 3 specoj da situacioj validas ne nur por homoj, sed ankaŭ por organizoj — kia AEA. Kelkfoje ni bezonas profesiulojn, kelkfoje ne. Kelkfoje ni devas uzi ilin. Kaj se ni ne kapablas distingi inter unu speco de situacio kaj alia, ni finfine trovos nin malŝparantaj tempon, perdantaj monon, kaj eĉ eble agantaj kontraŭleĝe. Bedaŭrinde, ne ĉiu malgranda organizo *kapablas* pagi la ofte multekostajn

servojn de profesiuloj, kaj tial, estas devigataj decidi kaj agi amatore — eĉ en situacioj en kiuj profesia helpo estas nepre bezonata.

Bonŝance, AEA ne estas en tia situacio. Ni ja havas sufiĉe da mono, por pagi profesion helpon, kiam ĝi malofte estas bezonata de ni. Kompreneble, se pagenda profesia helpo estas bezonata, la Estraro ricevas la aprobon de la membraro dum Ĝenerala Jarkunveno antaŭ ol fari la elspezon.

Do, ŝajnas al mi, ke helpo de profesiuloj, ĝenerale — se oni kapblas pagi — ja estas avantaĝa, kaj povas ŝpari al ni tempon, monon, kaj helpi nin eviti multajn problemojn. Do, kial kelkaj homoj en nia asocio havas tiom grandan senton de kontraŭo al profesia helpo? Kial nun ekzistas meze de ni tiu “kontraŭprofesiismo”? Al kiu avantaĝas la “amatoreco”?

Esperanto estas, por la plejparto de la homoj kiuj partoprenas nian komunumon, “hobio”. Homoj kiuj volontule laboras por niaj organizoj, ofte laboras por Esperanto en siaj libertempoj, kaj tial, ne volas fari la saman laboron tiam, kiun oni faras en sia profesia vivo. Tiel, oni amuzas sin en sia liberaj horoj, per sia amatora kunlaboro, for de la normalaj profesiaj vivo kaj premoj. Tiu volontula laboro, kvankam amatora, ja estas ĝuinda, kaj ja estas ege valora (kaj bezonata) por nia asocio.

Surprizinde, de tempo al tempo ja alvenas volontulo, kiu ja pretas

fari senpagan laboron por ni, kiun li/ŝi kutime faras profesie, en sia labora vivo. Meze de ni estas bibliotekisto, kiu pretas pasigi sian semajnfinojn en katalogante librojn por ni. Ni havas instruistojn, kiuj uzas horon post horo de siaj libertempoj por profesie disvolvi kursojn por ni, kaj varbi novajn Esperanto-lernantojn. Inter ni troviĝas arkitektoj, matematikistoj, dizajnistoj, komercistoj, verkistoj, lingvistoj, kaj multaj aliaj profesiuloj, kies valorega kontribuo, kiam disponebla, povas rapide kaj efike helpi nin.

La plejparto de la volontuloj, laŭ mia sperto, altestimas la oportunon kune labori kun profesiulo, kaj multe lerni de li/ŝi. Bedaŭrinde, ne ĉiuj amatoraj volontuloj bonvenigas la malavaran helpon de volontula profesiulo, kaj kelkaj el niaj membroj nun decidis eĉ propagandi kontraŭ profesiuloj. Ili insistas, ke aŭdi konsilon de profesiulo estas malŝparo de tempo — kaj mono — kaj ke estas precize la profesiuloj kiuj misinformas ĉiujn, konstante eraras, kaj intence misgvidas nian asocion. Ŝajnas al mi, ke laŭ ili, la sola “ĝojo” en nia asocio ekzistas pere de amatoreska kunlaboro. Ĉu vere? Mi devas malkonsenti. La problemoj kiujn mi rimarkis en nia asocio neniam estis kaŭzita de profesiuloj, sed ĝenerale ja de amatoroj, kiuj ofte senintence misgvidas nin aŭ eraras pro manko de sufiĉa kono.

Laŭ mi, estus pli avantaĝe por

ni ĉiuj agnoski, kiam profesia helpo estas ne nur bezonata, sed deviga por garantii la taŭgan funkciadon de nia asocio. Kaj laŭ mi, estus ankaŭ pli avantaĝe por ni ĉiuj, agnoski kaj laŭdi la malavaraĵajn kontribuojn de niaj volontuloj kiuj helpas nin per siaj *profesiaj* konoj kaj laboroj — kaj ke ili ja

multe helpas gvidi kaj valorigi la laboron de ĉiuj. Kaj niaj amatoraj volontuloj kaj niaj volontulaj profesiuloj multe kontribuas por la estonteco de nia movado, kaj por la ĝojo, de ĉiuj — kaj ambaŭ estas esencaj partoj de la spirito de nia asocio. □



## • Konu viajn kungesamideanojn

### Ashley Campbell

intervjuita de Katja Steele



Ashley naskiĝis en 1950. Lia patrino, Gladys, estis supera flegistino en malsanulejoj en

Burra kaj poste en Clare kaj ŝi bone ludis tenison. Lia patro, Henry, naskiĝis en Irlando kaj kiam 17-jara li estis sendita de orfejo, en kiu li loĝis, al agrikultura orfejo en Aŭstralio. Li iĝis laborema kaj kiel terkultivisto li vivtenis sin dum sia tuta vivo. Li bone dancis, estis energia, inventema, ekstroverta. Gladys estis introverta, honesta, tre diligenta, afabla homo. Krom Ashley ili havis filon – Chris.

La familio loĝis en malgranda bieno apud Clare. Ili havis multajn bestojn kaj fruktarojn. Ashley finance memstariĝis en 1968. En 1972 li komencis loĝi en komunumo kun aliaj homoj en Stepney,

poste en Goodwood, Rosewater kaj West Hindmarsh. Tiun loĝadformon li praktikas jam de 34 jaroj, de 1979 en Black Forest en “Seli Hoo”. Al la sama komunumo aldoniĝis en 1985 Sandor kaj poste Helen kaj la enloĝantoj de tiam ne posedas aŭton nek televidilon.

En la Adelajda Universitato Ashley iĝis inĝeniero kaj poste li laboris 4 jarojn ĉe la Publika Konstrua Departemento. Kaj nun? Krom ke li estas konsilisto pri konservado de energio kaj akvo, li diras:

“Nun mi fokusas miajn inĝenierajn kapablojn al sunenergia, konservado de energio kaj akvo. Mi konstruis multajn persunkuirilojn por fruktoj kaj legomoj kaj panelan persunkuirilon. Ĝi estas malpeza, portebla, sed bezonas permanan rotaciigon ĉiun duan horon por sekvi la sunon.”

Ne profesie, sed Ashley provis ankaŭ la metion de masonisto, kiam li kaj Annie konstruis por si etan ĉambron el adoboj. Ashley kaj Annie kunloĝas en “Seli Hoo” ekde 1987.

Bicikladon Ashley lernis en 1956, 6-jara. Tiu “fera ĉevalo” iĝis lia nedisigebla akompananto kaj inter la plej memorigeblaj komunaj aventuroj apartenas la 1000 kilometroj, kiujn li biciklis en Tasmanio. Ĝi estis parto de kampanjo “Rajdo por la riveroj” (1981), celanta savi la riveron Franklin. Kiel naturoprotektanto Ashley dum jaroj aktivis ankaŭ en la kontraŭnuklea movado kaj prenis parton en, ekzemple, la protesto ĉe uranmino Honeymoon. Alia grava eco

de Ashley estas lia vegetaranismo (de 1973). Lige kun ĝi li jam 25 jarojn aktivas en Manĝaĵkooperativo en sia loĝloko). Ne surprizas, ke siatempe Ashley kontraŭis ankaŭ la militon en Vjetnamo kaj aktive manifestacias sian starpunkton (1968).

Lia rilato al la Esperanto-movado estas relative nova. Esperanto estas ekzerco por la cerbo kaj unu el la komunaĵoj de la loĝantoj de “Seli Hoo” – li agnoskas. Nun Ashley fariĝis parto de la adelajda esperantistaro, regule prenas parton en la klubaj kunvenoj, kaj li ĉestis ankaŭ la vintrokursaron de “Esperanto en Sudaŭstralio”.

[El *Tamen plu*] □

## HISTORIETO PRI LA ROLO DE TEKNIKAĴOJ EN ESPERANTO EN AŬSTRALIO

de Terry Manley

Ekde la 1980aj jaroj kaj ĝis nun komputiloj konstante pli ludas gravan rolon en la evoluo de la disvastigo de Esperanto tra la mondo. Uzataj por krei gazetojn, por abonmendo kaj libromendoj, por eldono de libroj, por instrui per interretaj kursoj, por tuj interligi Esperantistojn trans la mondo, por faciligi planadon de Esperantokazoj kaj Esperanto-organizoj, por havigi al esperantistoj Esperanto-gazetojn, Esperanto-librojn,

Esperanto-muzikon kaj filmojn kun esperanta subteksto kaj por fari multajn aliajn aferojn.

En la Jan-Feb. 1989 eldono de *The Australian Esperantist* estis anonceto, ke la gazeto eldoniĝas laŭ “nova presmetodo” – “perkomputila kompostado”. Tio rezultis de la ŝanĝo de redaktoroj. Donald Broadribb je tiu eldono alprenis tiun rolon. Oni rimarkas ankaŭ ke preskaŭ samtempe Tom Elliot en NSK eldonis novan formaton

por *Telo*peo la ŝtata gazeto. Tom estis komputilisto kaj faris programon por organizi la libroservon de AEA, kiu funkciis ĝis lia morto en 1999. Dum la 1990aj jaroj la progreso de ĉiu ŝtato rilate al la uzo de komputiloj estis rapida. Max Wearing multe uzis por organizi la Somerkursarojn en tiuj jaroj. Bob Felby por fari *Tamen Plu* la ŝtata gazeto, kaj *La Lumilo* novaĵfolio de la kursaroj en SA.

Kaj komunikado eksterlanden multe faciligis.

En 1995 Alan kaj Edna Turvey kuraĝigis legantojn de *ĜK* kontakti ilin por fari interretan grupon. (*ĜK* Jan-Feb 1996).

En 1995 ĝemeloj Mark kaj Jeff Hayward, de la Sidneja grupo, kompilis programon “Supersigno” por uzo kun vinda sistemo.

En 1996 *ĜK* estis legebla per interreto. En 1997 PDF-libroj haveblis de Brazilo

Estis evoluo de la litertipoj tra la jaroj. En 1998 “Latin 3” plenumis rolon por interreta tiparo. Je

2002 “Unicode” ekprenis tiun rolon.

Kaj jen en 1998 estis jam sufiĉe granda listo de aŭstraliaj esperantistoj kun elektronikaj-poŝtadreso. Interreto ankaŭ donis grandan salton al radioprogramoj. Antaŭe nur eblas aŭskulti se oni estis sufiĉe proksime aŭ se oni havis radio-aparaton specialan. En 1999 Radio Pollando povis elsendi, per interreto, tra la tuta mondo sian esperantan radio-programon.

Ekde Aŭgusto 2003 la Esperanto-programoj en Aŭstralio de 3ZZZ estis dissendataj pere de interreto. En Julio 2001 la esperanta retpaĝo de AEA ĉe [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au) aperis. Starigis ĝin John Gallagher el Tasmanio.

En 2003 Penny Vos prizorgis la paĝon kaj ankaŭ iniciatis interretajn diskutgrupojn ĉe Yahoo.

En 2005 Igor Couto alprenis la laboron por desegni kaj ĝisdatigi la paĝaron kaj alligi ĉiun Aŭstralian grupon al tiu paĝaro. □

---

## Raporto de la prezidanto de Igor Couto

Karaj Geamikoj,

Estas granda plezuro por mi, skribi al vi pri kelkaj agrablaj okazaĵoj okazintaj ĉi jare.

Laŭ mi, la plej entuziasmiga novaĵo estas kompreneble la 2 novaj kursoj okazantaj ĉe la Univer-

sitato de NSW (UNSW). Unu el la kursoj estas regula Esperanto-kurso por komencantoj, kaj la alia estas oficiala pedagogia kurso pri instruado de Esperanto kiel fremda lingvo. Tiuj kursoj espereble helpos nin kreskigi la bezonatan

bazon de alt-kvalita instruado de Esperanto, kiun ni bezonas por disvastigi nian amatan lingvon. La oficiala kvalifiko (diplomo) ofertata de UNSW espereble faciligos la enkondukon de similaj kursoj en aliaj instruejoj tra nia lando. Eĉ pli kuraĝige por mi estas konstati la entuziasmon de Profesoro Daniel Kane, kiu instruas la esperantan parton de la instruista kurso, kaj de Doktorino Jill Murray, kies subteno al Esperanto respondecas por la oficiala enkonduko de la kursoj en la kadro de la Universitato.

Sciinte pri la kurso por komencantoj, la Esperanto-Klubo de Manly, en Sidnejo, decidis fari kortuŝantan kontribuon: la klubo pagis la kurskotizon de la studentoj de la kurso, kaj donacis al ili ĉiuj vortarojn. Eĉ pli kortuŝanta por mi persone, estas la stipendio nun ofertata de la Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo, al la diplom-pedagogia kurso. Tiu stipendio pagas la tutan kurskotizon — preskaŭ \$4,000. Bonŝance, Nicole Else kaj mi estas la ĉi jaraj ricevantoj de tiu malavara honoro.

Krom Nicole kaj mi, la tria studento de la pedagogia kurso estas Miranda Lutz, nia estimata Sekretario, kiu provizore haltigis sian gravan laboron, kiel parolpatologiisto, dum ŝi studas por akiri oficialan kvalifikon por instrui Esperanton. Entuziasmigite pri la nuntempa studo, kaj pri la pozitiva akademia etoso kreita de Jill Murray

kaj Daniel Kane, Miranda nun serioze konsideras la eblecon akiri Magistran Diplomon (angle: MA) pri Esperanto. Miranda, kune kun Nicole kaj mi, jam instruas Esperanton por UNSW, en la komenca kurso. Tiu kurso havas 11 studentojn, kaj preskaŭ ĉiuj el ili farigos novaj membroj de AEA.

Mi ankaŭ profunde feliĉas pri la vigla kaj valora laboro farata de nia nova membra asocio en Tasmanio, estrata de entuziasma kaj laborema Robert Budzul. Laŭ propono de Robert, la Somerkursaro de AEA de 2007 okazos en Hobarto, kaj la tasmania teamo de organizantoj bonkore volontulis por tiu granda tasko, kaj vigle kaj diligente nun laboras por certigi ke ĉio progresos glate. Profundajn dankojn de ĉiuj ni al la tasmanianoj!

La Estraro de AEA ankaŭ laboras diligente. Ekde la komenco de la jaro, oficiala Estrara Komisiono laboras por esplori diversajn administrajn kaj legajn problemojn rilate al la funkciado de niaj servoj kaj aferoj, al nia Statuto, kaj al nia strukturo. La Komisiono nun preparas sian gravan raporton pri tiuj esploroj, kaj baldaŭ ĝi estos sendita al ĉiuj membroj de AEA. Kompreneble, multe da esploro, diskuto, kaj plia studo estis bezonata, por garantii ke la Estraro donos al la membraro informon kiu estos ĝusta, kaj fidinda. Pro tiom granda kaj grava laboro, mi jam antaŭdankas la komisionanojn Miranda



Lutz, Steve Pitney kaj Heather Heldzingen.

Finfine, ĝis nun ĉi jare estis granda plezuro renkonti, konatiĝi kun, kaj paroli al multaj el niaj membroj. Mi kaj mia karulo Tim havis la bonŝancon gastigi kelkajn

esperantistajn amikojn ĉe ni, kio multe feliĉigis nin — tiaj oportunoj fari pli da amikoj estas la ĉefa kialo pro kiu la plejparto de ni komence lernis Esperanton!

Kun granda ĝojo, Igor Couto □

---

## Profilo de nia prezidanto de Penny Vos

Por mi, unu el la plej ekscitaj partoj de la Somerkursaro en 2005 estis renkonti Igor-on kaj Tim-on. Ili estis novaj en la movado, sed entuziasmaj pri partopreno. Tim devas atenti sian karieron je kiropraktiko, sed Igor estis preta iom prokrasti sian karieron kiel grafikdesegnisto, por helpi realigi la revon de Zamenhof.

Estas mirinde, kiom li faris dum la unuaj 18 monatoj!

Kun Steve Pitney, Alan Turvey kaj aliaj, Igor reorganizis la interretajn aranĝojn por AEA. Li organizis, ke nia AEA-domajno estu administrata de ni, por ke ni povu oferti subdomajn al niaj internaj kaj eksteraj volontul-grupoj, kaj al membrigitaj asocioj. Kaj li aranĝis sekuran konton per PayPal, por ke AEA povu akcepti interretajn pagojn kaj pagojn per kreditkartoj.

Igor desegnis novan dulingvan profesion retejon por AEA:

(<http://www.esperanto.org.au>)  
kaj organizis teamon de helpantoj

tra Aŭstralio. Li konstruis novan apartan retejon por la Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro:

(<http://aesk.esperanto.org.au>)  
kaj metis la adreson en taŭgajn internaciajn listojn (ekzemple:

(<http://www.esperanto.net>)

por helpi homojn trovi nin.

Laborante kun Hazel Green kaj aliaj, Igor preparis la novan retejon por la korespondaj kursoj de AEA:

(<http://kurso.esperanto.org.au>)  
kaj aldonis la eblecon pagi interrete.

Igor laboris kun koncernaj lokaj grupoj kaj asocioj, por provizi subdomajn kaj kromadresojn por retpoŝtado, kaj li preparis retejojn por pluraj Esperanto-organizo en Aŭstralio, ekzemple:

*Esperanto en Sudaŭstralio:*

(<http://sa.esperanto.org.au>);

*Esperanto-Ligo de Okcidentaŭstralio*

(<http://wa.esperanto.org.au>);

*Manly Esperanto-Klubo:*

(<http://manly.esperanto.org.au>) kaj

*Torquay Esperanto Coffee Club:*

(<http://torquay.esperanto.org.au>)

Igor preparis enretan kalendar-

on por anoncoj de la esperanta komunumo en Aŭstralio:

(<http://kalendaro.esperanto.org.au>).

Li lanĉis, kun helpo de Nicole kaj aliaj volontulaj tradukantoj kaj provlegantoj, la Retbutikon de la Libroservo:

(<http://libroservo.esperanto.org.au>).

Ĉi tiu retbutiko subtenas katalogon kun bildoj, diversaj valutoj, donac-kuponoj, rabatkuponoj, kaj aliaj progresaj servoj.

Oni daŭrigas laboron por fini tradukon en la retbutiko, kaj prepari retejon por la Esperanto-Federacio de NSK.

Igor helpis min kaj aliajn organizi Komunikado-grupon, teamo el esperantaj volontuloj kiuj provizas servojn kiel verkantoj, tradukantoj, tajpantoj, provlegantoj, kaj artistoj. La celo estas helpi AEA-ni kaj altiĝi la profesian nivelon de niaj presitaj kaj elektronikaj eldonaĵoj.

Igor helpis la bretonan esperantiston Henri de Sabates evoluigi profesian formon de la internacia broŝuro *PakEO*. Oni uzis tiun formon kiel desegnomodelon por aliaj lingvoj.

Uzante proponojn de esperantistoj ĉirkaŭ la mondo, Igor desegnis por AEA novan identigan simbolon, kiun la membroj akceptis en Adelajdo en 2005:

Uzante la novan identigan simbolon kaj ideojn de la estraro:

Igor desegnis novajn oficialajn ŝablonojn por AEA, estraranoj,

kaj servoj: leterkapojn, formularojn, fakturojn, kvitancojn.

Igor kaj aliaj preparis novan elektronikan formon de la nuna statuto de AEA. Nun oni povas libere elŝuti kaj presi rekte el la AEA-retejo tion, kaj aliajn oficialajn dokumentojn kaj formularojn. Igor helpis nian redaktoron Don Broadribb redesegni *Esperanto Sub La Suda Kruco*-n por atingi pli modernan kaj allogan aspekton. Igor desegnis novajn profesiajn reklamojn pri la Libroservo de AEA, Manlia Esperanto-Klubo, kaj Esperanto-Federacio de NSK, por aperigo en la nova eldono de la UEA-jarlibro. La redaktoro de la jarlibro gratulis pro la alta kvalito de la reklamoj!

Igor nun desegnas kaj helpas realigi la esperantan lumdiskon *Intervjuo kun Selten* de Rainer Kurz, inkluzive de aldoni subtitolojn en pli ol dekduo da lingvoj. Espereble oni disdonis la lumdiskojn senkoste dum la Universala Kongreso en Florenco.

Aliaj projektoj ankoraŭ preparataj de Igor inkluzivas novan ĝeneralan broŝuron pri Esperanto por uzado tra Aŭstralio; novan eldonon de la libro *Translation Course* de F. Banham; novan formon de la konata *Free Correspondence Course* de Manlia Esperanto-Klubo. Oni eble uzos ĝin kiel bazon por senkosta interreta kurso.

Krom esti la prezidanto de AEA, Igor multe laboras por Esperanto-Federacio de NSK. Por tio

li devas kelkfoje pretiĝi por fizika laboro, ĉar oni renovigas Esperanto-Domon en Sidnejo per purigado kaj farbado de la tuta domo; reorganizado de la oficejoj, kaj rekatalogado de la novsudkimruja kaj manlia bibliotekoj.

Pasintjare, Igor instruis Esperanton al klaso de 6-9 komencantoj, ĉiun semajnon dum 5 monatoj. Du el la studentoj kontaktis lin ĉijare, petante pli da lecionoj. Alia studento translokiĝis al Bolivio, kaj starigis sian propran Esperanton-parolantan internacian komunumon. La komunumo viglas kaj kreskas; nun ŝi instruas al ĉ. 20 infanoj, kaj penas starigi Boli-vian Esperanto-Asocion.

Intertempe en Sidnejo Igor helpas Esperanto-Federacion de NSK evoluigi komercan modelon por funkciigi esperantajn kursojn. Tiu modelo eble helpas aliajn grupojn kaj asociojn tra la lando. Dum sia “libera” tempo, Igor kaj Tim ĝuas partoprenadon en diversaj sociaj kaj publikigaj aktivoj de Manlia Esperanto-Klubo, ekzemple organizi eventojn, presi flugfoliojn pri Esperanto por loka disdono. (La identiga simbolo de tiu klubo estas


aparte malaĉa!).

Laste kaj grave, Igor negocis oficialan kurson por instruistoj de Esperanto kiel LOTE (“lingvo alia ol la angla”), en Universitato de NSK. Per tiu kurso, Esperanto ricevas la rangon de normala utila lingvo, agnoskita de la registaro. La kurso donas al esperantistoj el Aŭstralio aŭ aliaj landoj respektatan oficialan kompetentigon por instrui Esperanton. Ĝi altigas la scion de Esperanto kiel utila viva lingvo en akademia kaj ĝenerala komunumoj. Ĝi altigas la interesigon de LOTE-instruistoj kaj lernejoj decidantoj pri Esperanto. La kurso estas unika en la angla-parolanta parto de la mondo. (Brita Esperanto-Asocio, kiu atingis multon en la pasinta jaro, ne sukcesis interesi universitaton.)

Cinikeco estas normala parto de politiko en Aŭstralio, do estas malofta frandaĵo ke ni povas senti ke nia elektita reprezentanto multe laboras kaj donas veran talenton por firmaj strategioj por progreso.

Dankon, Igor. Daŭrigu!  
penivos@yahoo.com

□



Dua eldono de la verko de Nicole Else *Mummy, why can't we all speak the same language* nun haveblas.

Ĝi havas tre belan koloran kovrilon kaj enestas ilustraĵoj. Vidu <http://members.iinet.net.au/~nicolee/bookad.html>

La formato de la libro estas A4 kiel por la unua eldono. Ĝi haveblas de la libroservo por \$6.95 + sendokosto.

## Edna May Turvey (née Dash)

31.1.1925 – 30.7.2006

nekrologas Terry Manley

Kion skribi kaj kiel honori ĉi tiun etstaturan sed grandaniman sinjorinon? Certe Edna malaprobis se oni fanforonus pri ŝi. Dum la funebra ceremonio oni miris, ke ŝi tiel forte laboris por tiom da aferoj kaj konstatis, ke ŝi estis iom sekreta ne parolante pri ŝia laboro en aliaj kampoj. Sed tio ne necese signifas sekreton, nur profundan humilecon.



Edna May Turvey

Jen resumo de la nekrologo dum la funebro kaj iom pli pri ŝia Esperanto-agado:

Edna May Dash estis pranepino de Edward Dash, la patriarko de la familio Dash en Aŭstralio, kiu enmigris Aŭstralion en 1853. Edna estis la tria el kvar gefiloj de Charles Lawson Dash kaj Annie Burrill, kaj naskiĝis je la 31a de

Januaro 1925 en Luera NSK. La du filinoj Jean kaj Dorrie jam mortis kaj nun restas Frank, la plej juna.

Pri la memoroj de la montoj Edna skribis: “Ni loĝis en la montaro kaj estis malvarme. Iufoje niaj kruroj kaj brakoj estis bluaj kaj ruĝaj dum ni ludis en la neĝo. Kiam ni eniris la domon ni sentis kiom niaj manoj kaj piedoj estis brulantaj. Estis fajro en la kuireja forno kiu estis tre varma.” Ŝi parolis ankaŭ pri sia tasko liveri kukojn kiujn panjo kuiris por la najbaroj.

Estis malfacila tempo por Edna en la lernejo. Ŝia fratino kiu studis en instruista kolegio je tiu tempo, priekzercis la plejmodajn instrumentojn instruante Edna-n. Tial Edna studis en gimnazio 2 jarojn pli frue ol samaĝuloj. Sed ŝi ĝuis ludi hokeon tie.

Post la lernejo ŝi iris al Sidnejo por labori en fabriko Bonds. Ŝi registris la fabrikaĵojn kaj vendaĵojn.

Poste ŝi fariĝis la unua ina teknikisto pri la fabrikado de radioj laborante por AWA. Ŝi vojaĝis al Novzelando kaj Britio pro tia laboro.

Proksimume je la sama tempo ŝi komencis lerni Esperanton.

En la fruaj 1950oj ŝi vojaĝis al

Eŭropo, biciklante tie kaj ĉeestante esperantan UK-on. Reveninte al Aŭstralio Edna loĝis kun sia nesana patro kaj laboris kiel tramkonduktoro. Dum la 1950aj jaroj Edna multe laboris por la Sidneja Esperanto Societo, kiel indikate en *Esperanto en Aŭstralio*: “Anoj de la societo tributis al la multjara servo (sekr. SES, 1952-58, 1961) al SES fare de F-ino Edna Dash.” Ankaŭ en la sesdekaj jaroj Edna kaj la edzo Fred estis anoj kaj foje estraranoj en SES.

Krom Esperanto Edna dediĉis tempon al aliaj komunumaj grupoj. Ŝi posedis presilon kaj per tio helpis grupojn kiaj la anarkiisma, artisma, medikonservisma, kaj starigis grupon por recikli rubaĵon.

En la sesdekaj jaroj Edna loĝis sur 3,2-hektara arbara terpeco ĉe Lilyvale, sude de Sidnejo, kun siaj edzo Fred kaj geinfanoj Alan kaj Ruth. En 1970 ili translokiĝis al Darlington. Edna multe aktivis por konservi la malnovajn konstruaĵojn de la loko kiam la Universitato de Sidnejo komencis etendi sian limon en la najbarejon.

Kun juna familio kaj komuna agado ŝi studis arkeologion kaj

antropologion ĉe tiu universitato kaj gajnis diplomon kun honoro. Ŝia tezo estis pri la evoluo de lingvo. Vere granda atingo en tiuj cirkonstancoj.

Edna helpis en kampanjo por lokano elektiĝi en la loka registaro de Suda Sidnejo. Ŝi helpis organizi artan kaj manmetian parton de la festivalo de Sudsidnejo dum jaroj. Ŝi helpis ankaŭ pri kreema verkista grupo en la loka preĝejo.

Ĉirkaŭ 1990 Edna kaj Fred vendis la terepecon ĉe Lilyvale kaj Edna dediĉis pli da tempo refoje al Esperanto. Dum jardeko ŝi prizorgis la oficejon en Esperanto-domo. Ŝi instruis Esperanton en diversaj lokoj: la klubo mem, kvakera preĝejo, kolegio Sutherland kaj aliaj lokoj. Edna gajnis la Klerecan diplomon de AEA kaj estis unu el la ekzamenistoj por AEA en NSK.

Post la morto de Fred, Edna vendis la domon en Darlington kaj translokiĝis al la montaro. Tie ŝi aliĝis al grupoj pri Taj Ĉi, ĝardenumado, kaj arto. Ŝi konstruis artfarejojn en la malantaŭa ĝardeno.

Iuj el la lastaj vortoj de Edna estis: “Vi ne tutvivis ĝis vi mortis.”

Dankon Edna □

---

## UMEA

En jaro 2008 UMEA festos sian 100-jaran fondiĝdatrevenon. El tiu okazo UMEA invitas kaj petas, ke vi estu Jubilea Subtenanto de UMEA.

La kotizo estas 100 Eŭroj. La subtenantoj ricevos la jus aperintan pli ol 500-paĝan Esperantan-Anglan Medicinan Terminaron, abonon al *Medicina Internacia Revuo* (2007-2008) kaj en 2008 memorinsignon kaj memordiplomon. La Subtenantoj favorpreze rajtos partopreni nian jubilean konferencon en Krakovo (Pollando).

Pri la aliĝoj, pagmanieroj, ktp.j skribu al D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA. HU-9002 Győr, Pf. 143. Hungario, rete: [iferdr@t-online.hu](mailto:iferdr@t-online.hu) □

(Daŭrigo de la artikolo pri Hazairin, el *ENK* 83, de Dianne Lukes)

## Skizo de la plano por enkonduki Esperanton en Indonezio



Hazairin ekster sia domo



Ĉambro por konservi esperantajn librojn



Gefiloj kaj edzino de Hazairin



hs\_mbah\_indonezio

**Jaro 1.** (2005) Prepari lernolibron, distribui ĝin, verki Esperanto/Indonezian vortaron, paroli al individuoj, grupoj, radioj kaj verki artikolojn. Bezonis \$US5,000 por fari tion (sed nur ricevis \$5,000 AUD de AEA, kio estis  $\frac{3}{4}$  de kiom estis bezona)

**Jaro 2.** (2006) Daŭrigi ĉion, kio estis komencita dum 2005 kaj verki la Indonezia/Esperantan parton de la vortaro. Fari kurson por lerni instrui instruistojn kaj gajni permeson por paroli pri Esperanto en universitatoj. Bezonus \$US4000

por fari ĝin (sed ricevis nenion de AEA.)

**Jaro 3.** (2007) Prizorgi la instruon de instruistoj en lernejoj kaj kluboj. Paroli pri Esperanto en universitatoj. Komenci esperantajn turismon (vidu notojn sube). Bezonus \$US3,000 por fari ĝin.

**Jaro 4.** (2008) Gvidi instruistojn, kiuj ekinstruas Esperanton en lernejoj kaj kluboj. Komenci esperantan presadon (vidu notojn sube). Daŭri paroli pri Esperanto en universitatoj kaj aliaj lokoj. Bezonus \$US2,000 por fari ĝin.

**Jaro 5.** (2009) Daŭrigi prizorgon de ĉio, precipe esperantan turismadon kaj la esperantan presadon. Inviti AEA kunveni en Jogjakarta. Bezonus \$US1000 por fari ĝin.

**Notoj:** 1. Esperanta turismado estus farata de turist-spertuloj, kiuj povus aranĝi bonajn turismaĵojn en multaj lingvoj inkluzive de Esperanto. La profito estus por disvastigi Esperanton en Indonezio. 2. Esperanta presado presus kaj redaktus librojn, broŝurojn ktp en iu ajn lingvo por iu ajn lando bonkvalitajn sed malmultekostajn. La profito estus por disvastigi Esperanton en Indonezio.

#### Financa subteno de la plano

Indonezio vere estas tre malriĉa lando. Se Esperanto povos funkcii tie ĝi bezonos monon. Tri eblecoj por gajni monon estus:

1. *Esperantaj turismado* — Spertuloj povus aranĝi bonajn turismaĵojn kaj la profito estos uzata por Esperanto.

2. *Presado kaj eldonado* de libroj, broŝuroj ktp. de komercaj organizoj — la profito estos por Esperanto.

3. *Donacoj de aliaj Esperantaj Instancoj*, kiaj UEA, AEA, Oceania Komisiono, Azia Komisiono ktp.

Ĉe la AEA-kunveno en 2005 mi proponis ke AEA donu: \$US5000 — 2005; \$US4000 — 2006; \$US3000 — 2007 \$US2000 — 2008; \$US1000 — 2009. Post tiam ni esperas, ke 1 kaj 2 estos sufiĉe fruktodonaj por subteni la agadon.

#### Nomoj kaj kategorioj de novaj esperantemuloj

Nomoj de tiuj, kiuj lernas Esperanton rete:

1. M. Rizal Altway Jl. Brigjen Katamso no. 85, Janti, Waru, Sidoarjo 61256 No. Telp rumah: 031-8550130 HP: 031 — 081850 1512

2. Chitrahadi S — Surabaya

3. Mohammad Fahim" <fahim\_murni@hotmail.com — Bandung

4. Abdul Haris Adnan universitas negeri jakarta fakultas matematika dan ilmu pengetahuan alam Jurusan Fisika Jl. Pemuda No. 10 Rawamangun Jakarta Timur

5. Hanung — Wonogiri chanterell eus@yahoo.com

6. Yohanes Manhitu — Yogyakarta

7. Soesiana Silver Batu — Malang soesite@telkom.net

8. Hamdan — Salatiga itemputih@gmail.com

9. Kazmanian Setiagama — Jakarta, luwakireng@yahoo.com

10. Tono — Salatiga rtonno@gmail.com

11. Wira Pratama — Bandung, wira\_jo@lycos.com

*Nomoj de homoj, kiuj ricevis mian lernolibron kaj kiuj subtenas la esperantan movadon kaj helpis min disvastigi la Pragan Manifeston kaj la ĝisdatigon:*

**En Jogjakarta:** S-ro Wuwarji — Muslima Asocio; S-ro Harris — Studento; S-ro Fahrudin- Instruisto

de Politekniko; S-ro Agung – Prelegisto de Mina Inĝenierado; S-ro Agus – Mekanika Inĝeniero; S-ro Andi Searang – Manaĝero de Vojaĝejo; – Pacemulo S-ino Anna B – Agrikultura Inĝeniero; – Voluntulo en Ache S-ro Arinto; – Turisma gvidisto D-ro Akhada; – Ĉefo de Merci/Medikamentaj Provizoj D-ro Risa; – Estrarano de Merci S-ino Dwi; – Studento de Matematiko S-ino Endang; – Manaĝero de Silver Craft S-ro Hafid; – Santerapio S-ro Maswan; – Prelegisto S-ino Meti – Ekonomiisto/voluntulo en Ache; S-ro Nopriadi – Prelegisto pri Nuklea Inĝenierado; S-ro Muhibudin – Kuiristo; S-ino Sumarah – Instruisto; S-ro Lukman Hakim – Verkisto (esperantisto); S-ro Yuwono – Turisma Komerco (Esperantisto).

**En Lombok:** S-ro Idham Haliq – Ekonomiisto; S-ino Adiana – Instruisto; S-ro Tajudin – Teknikisto; S-ino Nurti – Flegistino; S-ro Muhir – Komputilisto; S-ino. Nelly Palala – Instruisto (Esperantolernanto).

**En Borneo:** S-ino Juhairiah- Instruisto – West Kalimantan

**En Moluccas:** S-ino. Heriyanti – Dept. de Turismo – Tidore Regency

Kaj multaj pli.

**Aldonaĵo de Debra McCarney pri la esperantaj retkursoj l-E.**

Iu proponis al mi retan kurson post la Adelajda 2005 kongreso mi kredas, sed mi ankaŭ ne scias kiam aŭ kiel Vera komencis traduki la retan kurson. Mi helpis ŝin je la fino kiam ŝi devis sendi la dosierojn al Brazilo. Mi helpis pri la komputilaj teknikaĵoj en tiu tempo.

Poste mi iel konstatis ke Jonathan Moylen klopodis surmeti alian kurson (verkitan de Hazairin) en interretan paĝaron sed ĝi ne bone funkciis, do mi komencis helpi pri tio. Mi ricevis la dosierojn en Word-formato de Hazairin dum januaro 2005 kaj mi komencis tiam. Tiu kurso ankoraŭ funkcias bone nun, laŭ mia scio.

La alia kurso, la Kurso de Esperanto de Brazilo, ankaŭ ja estas elŝutebla de la reto, sed mi ne scias ĉu la instrukcio estas havebla en la indonezia lingvo. Amiko en Germanio konsentis helpi pri tio, sed mi ne scias ĉu li jam finis aŭ ne. Mi sendis demandon al li antaŭ kelkaj semajnoj sed li ankoraŭ ne respondis. Eble estas lia sola ferio. □

---

## Libroservo de AEA

Pro diversaj problemoj en Sidnejo, la Libroservo de AEA aktuale malglate funkcias. Ĝia retadreso estas [libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au), kaj ĝia retpaĝo troveblas ĉe [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au).



## Esperanto-domo, la juvelo en la krono de June Perkins

Dum la pli ol kvin jaroj post kiam mi komencis lerni la lingvon, mi aŭdis multe pri Esperanto-Domo. Mirigis min ke la Movado havis tiel valoran konstruaĵon. Mi neniam vidis ĝin, kaj surprizis min kiam mi aŭdis ke granda renovigo okazas. Do mi plu enketis.



Je la komenco

En la fruaj monatoj de 2005 la situacio ĉe la domo malpliboniĝis. Akvo penetris la eksterajn murojn, kaj ŝimo troviĝis en la muroj. La libroj en la biblioteko odoraĉis pro la ŝimo kaj tio povus esti malbona por kaj la libroj, kaj ĉiu ajn, kiu laboras apude. Samtempe, la plankon de la etaĝo supre oni deklaris ne sufiĉe sekura por grupoj da personoj, ekzemple por la Zamenhofa Festo.

Do, la Prezidanto de la Federacio de NSK, Igor Couto, diskutis la farendan laboron ĉe la kunveno de la komitato ĉirkaŭ junio. Poste, spertuloj esploris la laboron, kaj bal-

daŭ, la vera amplekso de la tasko kompreniĝis. Kiel kutime, kiam la laboristoj inspektis la damaĝon, pli da difektoj estis malkovritaj. Ekzemple, la elektroluma sistemo estis danĝera kaj devas esti tute renovigita. Por subteni la novan plankon ĉe la unua etaĝo, plankaj subteniloj estis necesaj, ĉar la nunaj estis malfortaj pro la akvo.



Mateo ĉe la sceno

Ĉe la Zamenhofa festo, Igor povis montri al la membroj diversajn kvotojn de taŭgaj laboristoj. Anthony Gaskell, kiu estas profesia arkitekto, kunlaboris kun la komitato por kompari la diversajn kvotojn, kaj helpis en la finaj decidoj. Kun la plena subteno de la membroj, la laboro komenciĝis en majo, ĉijare. La ĉefa organizanto de la laboristoj, materialoj, ktp, estas Tim Wade-Ferrell. Tim diris al mi ke la tuta kosto de la renovigo povus esti ĉirkaŭ \$35 000. Ĉi-momente, la la-

boro kiu devis esti farita de la firmaoj de laboristoj, estas finita.



Terry uzas plenigaĵon

Sed la laboro de la volontuloj daŭradas. Tim taksas la kontribuon de la volontuloj ĉirkaŭ pli ol \$20 000. Kiam mi parolis al Tim, je la 5-a de aŭgusto, la volontuloj laborantaj tiutempe, estis Ian Wyles, Alan Dean, Igor, Miranda Lutz, kaj mirege, Terry Manley. Terry veturigis sin de sia hejmo, ĉirkaŭ 500 km for de Sidnejo! Kia dediĉo! Aliaj helpantoj estis Anita kaj Carol Lutz, kiuj skrapis la murojn. Matt Maguire ankaŭ helpis dum vizito al Sidnejo.

La ŝtuparon, kiu ĉiam estis ekstera, oni rekonstruis interne. Ankaŭ, la lit-ĉambro por gastoj ricevis izolajaĵon.

Ĉi tiuj pliboniĝoj faras la ĉambron pli komforta ol antaŭe por esperantaj vizitantoj kiam ili restos tie. Jam la nova planko estas finita kaj estas preta por poluri.

La elektra sistemo estis renovigita kaj aspektas bela, kaj certe estas malpli danĝera. La plafono en



Tim uzas plenigaĵon la teretaĝo nun havas novan “Gyp-rock”-surfacon, glatan kaj belan. La unua etaĝo nun havas specifan klasĉambron. Igor kaj Tim donacis tri komputilojn por la uzado de lernantoj kiuj povos lerni Esperanton per tiu metodo. Tiel malavara donaco estos tre helpa kiam lecionoj okazos tie, kiam la laboro estos finita.



Vidu la belan plankon!

Multe da laboro ankoraŭ restas nefinita. La Konsilio postulas ŝanĝojn en la preskribitaj anonctabuloj. Mi esperas ke la volontuloj estas spertuloj pri farbi, ĉar tio ankoraŭ estas farendata. La etoso inter la volontuloj estas tre bona; multe da

humoro, kaj ridado. Por tia malgranda grupo, entrepreni tian grandan taskon estas vere miriga. Mi certe gratulas ilin.

Kun tiaj fervoraj laborantoj, la estonteco de la Movado en Sidnejo ŝajnas esti en bonaj manoj. □



Volo kaj Igor kaj la nova ŝtuparo

## Pri la statuto de Marcel Leereveld

La statuto de asocio (kia A.E.A.) estas la sola firma, fidebla, netuŝebla referencato por decidi, kiamaniere kondukti kaj procedi en la asocio. Ĉar la statuto de organizaĵo devas enhavi (kaj konformi al) ankaŭ la leĝajn postulojn, ĝi fariĝis leĝe rekonata korpo. Tiu “korpo” povas “pluvivi” nur ĉar la membroj sekvas ĝian statuton.

Ĉar la statuto estas la spino de asocio aŭ, se vi volas, la nervsistemo de asocio, regulante la formojn de, kaj la rilatojn inter, ĝiaj partoj, ĝi estas ege malfacile ŝanĝebla. Oni enmetas artefaritan kokson en la homan korpon nur, se ĉiuj kuracistoj, aŭ preskaŭ, juĝas tion necesa. Oni ŝanĝas parton de la statuto nur, se ĉiuj membroj, aŭ preskaŭ, juĝas tion necesa.

Por montri, kiel necese malfacile estas ŝanĝi statuton (oni tre malofte faras tion), mi priskribos ĉi tie parton de nia Statuto, nome

tiun pri la uzo de nia mono kaj la pago de salajroj kaj la ŝanĝo de la Statuto [la emfazoj estas miaj]:

19. Decidoj [pri malpli gravaj aferoj, M.L.] estas farataj per simpla plimulto de voĉoj, **kun la escepto de decidoj pri:**

- (a) la kapitalo de la Asocio,
- (b) aliĝo al internaciaj organizaĵoj,
- (c) pago de salajro al ofichavanto, por kiuj du trionoj de ĉeestantoj devas voĉdoni por la rezolucio, kaj la ĉeestantaro devas reprezenti almenaŭ trionon de la tuta membraro,
- (ĉ) ŝanĝo de la Statuto (vidu sub paragrafo 31).

31. Ŝanĝo. Ĉi tiu Statuto povas esti ŝanĝata nur:

- (a) de Ĝenerala Kunveno kondiĉe, ke du trionoj de ĉeestantoj voĉdonu por la ŝanĝoj, kaj ke la ĉeestantaro repre-

zentu almenaŭ trionon de la membraro

(b) post diskuto en Ĝenerala Kunveno, per ĝenerala voĉdono en kiu la voĉdoniloj estas senditaj poŝte al ĉiu membro, kondiĉe, ke voĉoj (kalkulitaj 90 tagojn post la dissendo) estas ricevitaj el almenaŭ triono de la tuta membraro, kaj almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas por la ŝanĝo.

En ambaŭ kazoj la membroj devas esti informataj pri la proponataj ŝanĝoj almenaŭ tri monatojn antaŭ la voĉdono.

Imagu: Se A.E.A. havas 210

membrojn, la Jarkunveno devas reprezenti almenaŭ 70 membrojn, kaj de tiuj almenaŭ 47 membroj devas voĉdoni por la ŝanĝo. La sama malfacileco okazas ĉe la alternativa poŝta voĉdonado. Tio praktike okazas nur, se preskaŭ ĉiuj membroj samopinias pri la ŝanĝo.

Kaj tio estas la celo de tiu malfacileco, por ke la organizoj restu pli stabilaj. Kaj por ke novaj membroj ne ŝanĝu ekzistantan organizon anstataŭ starigi sian novan kun novaj, aliaj, celoj kaj procedoj. □

---

## Indekso 2006

79 = januaro-februaro

80 = marto-aprilo

81 = majo-junio

82 = julio-aŭgusto

83 = septembro-oktobro

84 = novembro-decembro

Ekzemple: 80/5 = majo-junio, paĝo 5

### AEA

Celo de AEA (Miranda Lutz) 83/26

Kasraporto 80/26

Korespondkursa servo de AEA 2005 (Hazel Green) 82/18

Krizo por Esperanto en Aŭstralio (Henry Broadbent) 83/13

Mesaĝo de la sekretario 82/12

Nova abon-/membreco-prezo 81/3

Pri la statuto (Marcel Leereveld) 84/27

Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno de AEA 2006 80/18

Raporto de la prezidanto (Igor Couto) 84/15

Raporto de la sekretario (Miranda Lutz) 84/5

Raporto de Miranda Lutz 80/14

Statistiko: membraro de AEA 1990 kaj 2006 (📊) 81/12

[Vidu ankaŭ: **Somerkursaro**]

### Asocioj

IFEF deziras tutmondiĝi (Jindřich Tomášek) 81/16

### Diversaĵoj

Anekdoto vera (📖) 83/10

Ĉu esti aŭ ne esti...Profesia? (Franciska Toubale) 82/21

Esperanta futbalteamo volas kvalifikiĝi por la Monda Pokalo en Sud-Afriko en 2010 (82/18)

Historieto pri la rolo de teknikaĵoj en Esperanto en Aŭstralio (Terry Manley) 84/14

Esperanto-domo, la juvelo en la krono (June Perkins) 84/25

Informoj de Vinilkosmo 81/28  
 Interesaĵo el Cinio 83/10  
 Kelkaj historiaj fotoj (Marcel Leereveld) 84/3  
 Kial la kontraŭprofesiismo? (Igor Couto) 84/11  
 La dua Medalo de Toleremo 83/27  
 La enkonduko de Esperanto en Indonezio (Dianne Lukes) 83/29, 84/22  
 Libroservo: ĉu financa profito estas la plej grava afero? (Nicole Else) 83/24  
 Libroservo: necesega por ni (db) 83/25  
 Mi serĉas Madono-bildkartojn 80/9  
 Preskaŭ pasis kvindek jaroj (László Farkaš) 83/22  
 Radio 3ZZZ 83/28  
 Sydney Theatre Company ludas en Esperanto (Rainer Kurz) 81/26  
 UMEA 84/21

**DVD-oj**

*La duonokulvitro* (81/23)  
*Gerda malaperis!* 82/29  
 Nova DVD-filmo en Esperanto 79/4

**Ekzamenoj:**

Sukcesis en ekzamenoj 80/4, 81:7

**El la regionoj**

Nova klubo en Torquay Vic (Carol Lutz) 83/23  
 Radikala Melbourne 79/15  
 Urbestro vizitis la manlian klubon (Anthony Gaskell) 83/11  
 Vintra Esperanto-lernejo en Adelajdo 3-4 junio 2006 (Zbigniew Wybraniec) 82/30

**Geografio, bestoj, plantoj**

“Ĉasi” la koalojn sur Insulo Kanguruo (Franciska Toubale) 81/8  
 De Kakadu al Lascaux (Helen Palmer) 79/16  
 Fotitaj de Margaret Furness 80/15  
 Nia plej aĝa loĝanto (testudo) 79/31  
 Taglibro pri birdidoj de la mediestuda grupo ĉe Tatha Somerkursaro (Terry Manley) 80/6  
 Vizito al Nacia Parko Bournda (Franciska Toubale) 80/5  
 Vietnamujo, Francujo, Kroatio (Franciska Toubale) 79/6

**Instruado**

Katja Steele intrvjuas Igor Couto-n pri la nova kurso por Esperanto-instruistoj 82/5  
 Lerneja raporto — 2005 (Gordon Coleman, tr. Max Wearing) 82/8  
 Oficiala kurso pri instruado de Esperanto (Igor Couto) 81/4  
 Pri la kurso ĉe la Universitato de NSW (Mateo Maguire) 83/5  
 Pri la unua tago de la kurso en la Universitato de Novsudkimrujo (Nicole Else) 82/4  
 Reguloj por AEA kursaroj (Marcel Leereveld) 83/18

**Interrete**

AEA-forumoj kaj retdiskutlisto 84/10  
 Biologia libraro 79/21  
 Nova-malnova paĝaro por informado pri Esperanto [informado.net] 82/21  
 Katalogo de esperantaj postmarkoj 81/6  
 Listo de Esperanto-grupoj 81/6  
 Literaturo en Esperanto sur la Reto (db) 81/10, 82/211, 83/11 *Najlonkorda Liro* de Niĉjo Nicholas]

**Komputiloj**

Komputilprogramoj en Esperanto 84/10  
 Nova verkprogramo esperanta (*Esperantoedit*) 81/5

**Kongresoj**

4a azia kongreso de Esperanto 14/19  
 6a ĉina kongreso de Esperanto 14/20  
 62a internacia junulara kongreso de TEJO 79/21  
 Bela Florenco (Heather Heldzingen) 84/6  
 Kongreso 2007 de NZEA 83/11

**Lingvo**

Bertilo Wennergren pri “devas ne” 82/16

### 30 | esperanto sub la suda kruco

For the Beginner: Confusing Words (db) 82/13  
For the Beginner: Unusual Word Usage (db) 81/13  
La origino kaj evoluo de lingveco (Brian Fox) 82/22  
La specialeco en la esperanta vortformado (Marcel Leereveld) 80/22

#### **Nekrologoj**

Ahrens, Rolf 79/13  
Turvey, Edna 83/6, 84/20

#### **Novaĵoj**

La nova televido-stacio Esperanto per Interreto 79/51m 83/10

#### **Odlo Bokserp**

79/30, 80/30

#### **Opinioj**

La homara suferado (Marcel Leereveld) 81/9

#### **Personoj**

Broadribb, Donald 84/10  
Campbell, Ashley (intervjuita de Katja Steele) 84/13  
Couto, Igor (Penny Vos) 84/17  
Desailly, Paul 83/23  
Gordon, Adam Lindsay (Franciska Toubale, John Adams) 83/16  
Harry, Ralph [“Ĉu fama esperantisto estis spionestro?”] (Trevor Steele) 83/3  
Horvath, Sandor (intervjuita de Katja Steele) 83/13  
Palmer, Patricia (intervjuita de Katja Steele) 81/24  
Kiu estas la vera Pat Palmer? (Odlo Bokserp) 82/11  
Roy, Nancy (intervjuita de Katja Steele) 82/3  
Sinclair, Bill [“La bonega klimaro de Melbourne!”] (Marcel Leereveld) 80/9  
Torres, Rubén 83/27  
[Vidu ankaŭ **Nekrologoj**]

#### **Prelegoj**

Parolado de D-ro Peter Ellyard 79/25  
Why China Respects Esperanto (Paul Desailly) 79/11

#### **Rakontoj, dramoj, poemoj**

Demando pri kredo (Gaye Phillips) 84/7  
La nova forno de Onklino Matilda (Tony Peterson) 69/22  
Oficiala kunsido de la Tuttriba Sekurec-Konsilio (Trevor Steele) 80/10  
Rep van Ŭinklo [premiita dramoj] 81/22  
Rimi aŭ ne rimi (Jack Drake, tr. Gaye Phillips) 81/27  
Vespero pri Esperanto antaŭ la komenco de nova Esperanto-kurso (anonima verkinto) 81/25

#### **Recenzoj**

*Etimologia vortaro de la propraj nomoj* [recenzo de db] 81/7  
*Femina – revuo en esperanto, ne nur por virinoj* [recenzo de db] 82/19  
*Klaŭstralio* [recenzo de db] 81/6  
*Kun diablo en la korpo* [atentigo] 82/3  
*La lando de la blinduloj* (H.G. Wells) [recenzo de db] 83/9  
*La vintra fabelo* (William Shakespeare, tr. Humphrey Tonkin) [recenzo de db] 83/8  
*Making World Peace Real* [recenzo de Renato Corsetti] 83/7  
*Ordeno de verda plumo* [atentigo] 83/6  
*Paĉjo kio estas rasismo?* [atentigo] 80/14  
*Vorto mozaiko* [atentigo] 80/14

#### **Somerkursaro de AEA 2006**

Fotoj 81/17  
Kianinny – kia loko! (Terry Manley) 81/21  
Raportas Bob Felby & Martin Gray 80/1

#### **Somerkursaro de AEA 2007**

Informoj pri la informoj pri la somerkursaro (Marcel Leereveld) 83/17  
Summer School Also for our Children (Marcel Leereveld) 82/7

#### **Somerkursaro de AEA 2008 & 2009** (Debra McCarney) 82/12

## Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la januaro-februara numero: 5a de decembro 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio  
[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)



## La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio  
<http://www.esperanto.org.au/>

*Prezidanto:* **Igor Couto** | [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

*Sekretario:* **Miranda Lutz** | [sekretario@esperanto.org.au](mailto:sekretario@esperanto.org.au)

*Kasisto:* **Stephen Pitney** | [kasisto@esperanto.org.au](mailto:kasisto@esperanto.org.au)

*Membreco:* \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

*Pagu al Libroservo de AEA* | [libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)



## La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando  
<http://www.esperanto.org.nz/>

*Prezidanto:* Bradley McDonald | [bradley.m@extra.co.nz](mailto:bradley.m@extra.co.nz)

*Kasisto:* Jackie Fox

*Sekretario:* Howard Gravatt | [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Membreco:** \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo  
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libroservo de Aŭstalia Esperanto-Asocio

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

# **LA SUDA KRUCO**

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

**Print Post Approved:**

**PP631048/00005**

POSTAGE  
PAID  
AUSTRALIA

**SURFACE  
MAIL**